

# BULTENO

GERMANA  
ESPERANTA  
FERVOJISTA  
ASOCIIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung  
deutscher Eisenbahner-Esperantisten

Fondita 1952

Numero 1

Januaro/Februaro 1966

## VENU MULTNOMBRE AL UTREĤT

Post multaj jaroj okazos denove en Nederlando kongreso de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF). De la 14a ĝis la 20a de majo gastigos Utreĥt, unu el la plej rimarkindaj urboj, nin esperantistajn fervojistojn el tuta Eŭropo. Detalojn pri la programo entenas „La Internacia Fervojisto“. Kiel kutime ni ne publikigas ilin, sed donas ĝeneralajn informojn pri la kongresa lando kaj urbo.

La redakcio

La naturaj cirkonstancoj ŝajnis ne favori la teritorion de la hodiaŭa Nederlando. El la unuiĝo de lando kaj maro fariĝis amaso de sablo kaj ŝlimo, kiun la glacia epoko estis postlasinta. La enloĝantoj komencis defendi la teron konstruante ekde la 9a jarcento digojn kontraŭ la maro. Tiu rezisto kontraŭ la naturaj potencoj treege influis la tieajn homojn ĝis nuntempe. La Nederlandanoj gajnis intertempe 40% de sia grundo, kaj ĉiam ili devas gardi kaj, se necese, batali por konservi la havaĵon. Kruela batalo por vivteni sin kaj la praktikitaj religioj faris la Nederlandanojn seriozaj, laboremaj, obeemaj al leĝoj, helpemaj kaj gastemaj. La akvo unuigas kaj same dividas la landon. Reto de riveroj kaj kanaloj ebligas la aliron ĉiuloken, sed aliflanke izoligis ankaŭ regionojn, insulojn kaj lokojn, kio evidentiĝas en diversaj dialektoj, akcentoj, moroj kaj kutimoj.

La historio de Nederlando estas tiel varia, ke ĝi ne povas esti skizata en siaj plej gravaj trajtoj. Frankoj, Germanoj, Francoj kaj Hispanoj multe kontribuis al la hodiaŭa fenomeno. Post 80jara batalado kontraŭ la Hispanoj en la 16a jarcento sekvis grandioza, ora epoko, dum kiu Nederlando prosperis sur ĉiuj terenoj, ricepe en la surmara komerco. La monarkio enkondukiĝis komence de la 19a jarcento kaj restis ĝis nun konservita. La hazardo de la historio kondukis al tio, ke du germanaj aristokratoj edziĝis al nederlandaj

reĝinoj en tiu jarcento antaŭ kaj post la naciista reĝimo, sub kiu ankaŭ Nederlando devis suferi kvin jarojn.

Hodiaŭ Nederlando apartenas al la prosperantaj nacioj en la Eŭropa Ekonomia Komunumo kun stabila registaro. Bedaŭrinde ankaŭ en Nederlando altiĝis la prezoj konsiderinde. La kongresanoj rememorante pri la 5a IFEF-kongreso 1953 en Utreĥt konstatos tiurilate konsiderindan diferencon.

La Nederlandaj Fervojoj, en sia strukturo iom aliaj ol la Germana Federacia Fervojo, kiu devas pagi malprofitdonajn taskojn de la ŝtato per pligrandiĝanta deficit, bonege funkcias. De kelkaj jaroj jam ne plu estas uzataj vaporlokomotivoj. Ili estis anstataŭitaj per dizelaj kaj elektrikaj. Ĉie regas la tradicia pureco kaj precizeco en modernaj stacidomoj. En la manko de rabatoj por pasaĝeroj estas rekonebla la komercista spirito konservi eble plej maltaltan normalprezon por la amaso. Eble mankas iaj avantgardistaj trajtoj ekz. uzi allogajn kolorojn por la vagonoj. Sed ĝenerale niaj nederlandaj gekolegoj povas fieri pri la nuna stato kaj situacio de la Nederlandaj Fervojoj. Cetere en Utreĥt rezidas la fervoja ĉefdirekcio en impona, ruĝstona konstruaĵo, dum la registaro havas sian lokon en Den Haag.



Utreht, la urbo de la 18a IFE F-kongreso, apartenas al la kvar plej granda en Nederlando.

En la samnoma provinco situas la palaco de la reĝa familio, pri kiu la ilustritaj revuoj lastatempe amplekse raportis. La urbo Utreht estas regata de 100 metrojn alta turo de „la katedralo,

anda ŝtormo en la toj de la katedralo, granda placo kaj strato. orilaro el la jaro 1663. Baldo kiel grahtoj, pentrin-daj frontonaj domoj, kluzoj, foirkonstruaĵoj kaj la multnombraj familiaj domoj, kiuj vespere donas senĝenan enrigardon en la salonojn.

En majo floros milionfoje la tulipoj, la plej famaj floroj de Nederlando. Unu el tiuj aperas kiel simbolo sur la kongresmarko. Ni ne dubas, ke la membroj de nia asocio eluzos multnombre la favoran okazon viziti nian najbaran landon. Tie revigliĝis la fervojista movado post la milito, tie multe laboras la estraro de IFEF por la bono de nia movado. Ne necesas akcenti, ke ankaŭ la Universala Esperanto-Asocio kaj la Universala Esperanto-Ligo havas sian sidejon en Nederlando.

Niaj nederlandaj gekolegoj preparis bonegan programon, por ke vi bonfartu en la internacia familio de esperantistaj fervojistoj. Aligu tuj, se vi ankoraŭ ne faris ĝin.

Gis revido en Utreht!

W.B.

## 18. Kongreß des Internationalen Verbandes der Eisenbahner-Esperantisten (IFEF)

### Anmeldeformular

mit Verbandsorgan „La Internacia Fervojisto“ bereits verteilt. Nachforderung nur über Korrespondenzanschrift.

### Anmeldung

unmittelbar über Korrespondenzanschrift bis spätestens 1. Mai 1966.

### Bankkonto

9144889, Algem. Bank Nederland, Damrak 33, Amsterdam, mit der Angabe „Esperanto Kongreso“.

### Geldüberweisung

unmittelbar an Bank (evtl. über ein Konto der Eisenbahn-Sparkasse) oder Postscheckamt.

### Klebeurkunden

Anforderung unmittelbar über Korrespondenzanschrift. 25 Klebeurkunden kosten 0,50 hfl oder 2 Antwortscheine.

### Kongreßbeitrag

bis 31. März 25,— hfl, später 35,— hfl. Für Pensionäre, Ehefrauen und Jugendliche unter 19 Jahren 12,50 bzw. 15,— bzw. 20,— hfl.

### Kongreßgebäude

N. V.-Huis, Oudegracht 245, Utreht

### Korrespondenzanschrift

W. L. van Leeuwen, Stationsplein 25, Amsterdam (C.), Nederlando.

### Weitere Angaben

über Kosten für Unterbringung und Ausflüge bitten wir dem Anmeldeformular sowie den Veröffentlichungen im Verbandsorgan „La Internacia Fervojisto“ zu entnehmen.

## Mitteilungen des Vorstandes

### Fernkursus

Nur noch ein Jahr trennt uns vom 19. IFEF-Kongreß in Fulda. Wer jetzt die Zeit zur sprachlichen Schulung nutzt, kann sich bis zum Mai 1967 fließend mit seinen Berufskollegen aus dem Ausland unterhalten. Wir rufen vor allem diejenigen auf, die nicht regelmäßig an einem Sprachkursus teilnehmen können. Schreiben Sie an die Briefschule G.m.b.H. 6 Frankfurt (Main) Untermainkai 66

### Fotoarchiv

Wir legen ein Fotoarchiv an und bitten hierzu um Ihre Unterstützung. Benötigt werden Bilder (schwarz-weiß oder farbig) im Format bis zu 7 x 10 cm mit folgenden Motiven:

IFEF-Kongresse,

GEFA-Jahresversammlungen,

sonstige wichtige Veranstaltungen mit deutschen und ausländischen Eisenbahner-Esperantisten (Kursusende, Besuchergruppen, Regionaltreffen).

**Angenommene Fotos werden angekauft, die übrigen zurückgesandt.**

Wir bitten, entsprechende Bilder mit allen erforderlichen Angaben einschl. solchen über den Einsender an die Sekretärin unserer Vereinigung zu übersenden. Anschrift: Seite 4

### Jahresbeitrag

Unsere Vereinigung und vor allem der „Verband internationaler Eisenbahner-Esperantisten“ ist auf Ihren Jahresbeitrag angewiesen. Bitte, überweisen Sie möglichst bald **3,50 DM** an Ihren zuständigen Bezirksbeauftragten, der den Betrag auf das Konto Nr. 40372 bei der Eisenbahn-Sparkasse Frankfurt (Main) abführt.



## Zenträlbücherei

Unsere Zenträlbücherei wird laufend mit Neuerscheinungen bereichert. Leider läßt sich nicht die Absicht verwirklichen, in BULTENO eine Bücherliste nach dem derzeitigen Stand mit Bewertungsmerkmalen zu veröffentlichen. Eine solche Liste wird jedoch vorbereitet und im Umdruckverfahren den Bezirksbeauftragten bekanntgegeben.

Wir empfehlen vor allem den Kursusleitern, von dem reichhaltigen Angebot der Zenträlbücherei Gebrauch zu machen.

Anschrift des Beauftragten: Seite 4

## Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten

### El la grupoj

**Duisburg-Wedau.** La 13an de novembro 1965 prezentis s-ano Kirschgens (grupo Wedau) filmojn pri la internacia Esperanto-somerumejo en Bela Palanka/Divljana (Jugoslavio). La entuziasmitaj rigardantoj sekvis kun granda atento la prelegon.

**Frankfurt.** La 15an de decembro 1965 salutis d-ro Lang, la komisiito por la distrikto Frankfurt, 20 gekolegojn, kiuj estis kunvenintaj en la fervoja kantino okaze de la Zamenhoftago. S-ano Ritterspach prezentis diapozitivojn pri la tiujara jarkunveno de GEFA en Stuttgart. Oni aŭdis surbendigitan ekstraktan el prelego de UEA-prezidanto d-ro Lapenna kaj kunkantis popolkantojn, dum brulantaj kandeloj akcentis la baldaŭan Kristnaskofeston.

**Nürnberg.** En la fervoja informilo „Amtsblatt der Bundesbahndirektion Nürnberg“ troviĝas en n-ro 38/65 atentigoj pri novaj kursoj, GEFA-jarkunveno kaj IFEF-kongreso en Nederlando.

**Schwerte.** En la stadidomo de Schwerte komenciĝis fine de novembro 1965 nova kurso por komencantoj, kiu estas frekventata sufiĉe bone. La loka gazeto raportis favore.

**Schwelm.** Sub la surskribo „Esperanto peris edziĝon inter Germano kaj Finnlandano“ priskribis la loka gazeto „Schwelmener Zeitung“ la Zamenhof-feston, kiun partoprenis 40 esperantistoj el la Ruhr-regiono. Pri la iama kaj nuna Japanio raportis per lumbildoj japana gasto Seiichi Tada.

**Stuttgart.** Kiel unu el la pozitivaj sekvoj de la lastjara GEFA-jarkunveno komenciĝis la 12an de novembro en la

faklernejo nova kurso, kiun frekventas precipe junaj kolegoj. La kursvesperojn vigligas vizitantoj el eksterlando, diapozitivoj pri Esperantujo, diskoj kaj sonbendoj.

Por antaŭkristnaska festo la 5an de decembro prezentis la fervojista horo antaŭ 600 personoj en la riparejo de Bad Cannstatt ankaŭ popolkantojn en Esperanto, kiuj kune kun priesperanta skeĉo estis akceptitaj kun granda aplaŭdo. La ĉeestantaj eminentuloj esprimis sian specialan gojon pri tiuj programeroj. Ankaŭ la loka gazeto favore raportis.

La 11an de decembro okazis Zamenhofesto en la hotelo „Wartburg“. S-ano Wagner, estro de la naturamikaj esperantistoj, parolis pri la temo „D-ro Zamenhof kaj la nuntempo“, dum pastoro Burkhardt, prezidanto de KELL, montris diapozitivojn pri loko kaj lando de la 50a UE-kongreso. La fervojistoj kontribuis per muzikista trio.

**Wuppertal.** En la fervoja informilo „Amtsblatt der Bundesbahndirektion Wuppertal“ troviĝas en n-ro 44/65 detaloj pri novaj kursoj projektitaj en sep lokoj kaj atentigoj pri la venontaj IFEF-kongresoj.

### Denove radioelsendoj

La Svisa Kurtonda Radiostacio rekomencis siajn elsendojn en Esperanto la 7an de novembro 1965 sur la ondoj 48,31 kaj 31,46, tagmeze krome sur 13,94, vespere krome sur 25,61. La elsendigo okazas lunde kaj merkrede je la 12.00, ĵaŭde kaj sabate je la 21.15 horo. Korespondantoj ricevas senkoste la ilustritan sendprogramon. Adreso: Svisa Kurtonda Radio, Esperanto-fako, Giacomettistr. 1, 3000 Bern 16, Svislando.

## Jarkunveno de la francaj gekolegoj

Fine de novembro 1965 okazis en la belega sudfranca urbo Lyon la jarkunveno de FEFA. Partoprenis ĉ. 70 gesamideanoj, inter ili eksterlandanoj el Italio, Nederlando, Skotlando, Svislando kaj Germanio. La organiza formo de la jarkunveno nun similas al tiu de nia asocio. Sabatona posttagmeze la gastigantoj montris la ĉarman urbon trafluatan de la riveroj Rhône kaj Saone. La distran vesperon organizis ĉefe la junulara grupo el Paris, kiu multnombro estis partopreninta ankaŭ la GEFA-jarkunvenon en Stuttgart. Dum la oficiala kunveno dimanĉon antaŭtagmeze i. a. la ĝisnuna FEFA-estraro estis reelektita. Kulmino el vidpunkto de bongustulo estis la abunda bankedo, kian oni povas ĝui nur en Francio. Ĝi okazis en agrabla restoracio situanta en la antikva kvartalo kaj daŭris la tutan dimanĉan posttagmezon. Koran dankon al la organizintoj.

Günther Doliwa

### Zeitschriftenumlauf

Die bei unserer Vereinigung eingehenden Zeitschriften werden nach ihren Herkunftsländern an die Esperanto-beauftragten der nachstehenden Bezirke verteilt, die sie etwa sechs Monate nach Erscheinen dem Archiv zuführen. Wir empfehlen unseren Mitgliedern, sich über die zahlreichen Ereignisse auf dem laufenden zu halten und die Esperanto-Zeitschriften bei den genannten Stellen anzufordern.

**Hamburg:** Belgien, Dänemark, England, Niederlande

**Hannover:** Frankreich, Jugoslawien, restliche Länder

**Nürnberg:** China, Finnland, Polen

**Regensburg:** Schweiz, Spanien, Übersee

**Saarbrücken:** Italien, Schweden, Ungarn

**Wuppertal:** Bulgarien, Österreich, Tschechoslowakei

### Anoncoj

Korespondadon kun germanaj gefervojistoj serĉas 24jara japano. Adreso: s-ro Yoshitatsu Kimura, P. O. Kesto 119, Shinjuku, Tokio, Japanio.

Kastelo Grésillon, la esperantista kulturdomo, ofertas ankaŭ tiujare riĉan programon, kiu komenciĝas la 1an de aprilo kaj finiĝos la 11an de septembro 1966. Detaloj kaj prezoj per „Esperantista Kulturdomo, Kastelo Grésillon, 49 Baugé (M.-et-L.), Francio.

### Tutkore

ni dankas pro ĉiuj salutoj kaj bondeziroj, kiuj atingis nin, ĉefe la redakcion, okaze de la pasintaj festotagoj.

Germana Esperanta Fervojista Asocio

### Bedaŭrinde

ni devas informi niajn legantojn, ke pro financaj kaŭzoj aperos BULTENO en 1966 nur kvinfoje anstataŭ sesfoje.

La redakcio



# Vorstand und Beauftragte der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk

## Vorstand

**Vorsitzender:** BOI Gießner, Bf Elze (Han); Basa 949/852/31  
**Sekretärin:** BOS'in Kruse, Sozialamt Frankfurt; Basa 955/5615  
**Schriftleiter:** BOI Barnickel, Tarifamt Frankfurt; Basa 955/5683

## Sonderbeauftragte

**Kassierer:** BAmtn i R Denk, Offenbach (Main), Landgrafening 17  
**Sprachprüfungen:** BOAmtn Dr. Lang, Prüfungsamt bei der BD Frankfurt; Basa 955/1501  
**Fachwörterangelegenheiten:** BI Ritterspach, Tarifamt Frankfurt; Basa 955/2239  
**Bücherei/BULTENO-Versand:** BOBw Schiermann, Bf Elze (Han); Basa 949/852/25  
**Archiv:** ES Barmaneter, Bf Woringen (Schwab); Basa 964/824/365

**Jugendangelegenheiten:** BS Doliwa, Bf Cordingen über Hannover; Basa 949/850/893/6122

## Bezirksbeauftragte

**Augsburg:** BI Sturm, BA Kempten; Basa 964/844/202  
**Essen:** BOAmtn Schnetzer, Bf Hamm (Westf); Basa 944/807/391  
**Frankfurt:** BOAmtn Dr. Lang, Prüfungsamt bei der BD Frankfurt; Basa 955/1501  
**Hamburg:** BOI Lepke, BD Hamburg — B-Büro —; Basa 947/5444  
**Hannover:** BS Heimlich, Bm Soltau (Han); Basa 947/850/127  
**Karlsruhe:** BOI Hug, BD Karlsruhe — Ps-Büro —; Basa 953/5005

**Kassel:** BOS Tasler, BD Kassel — Ps-Büro —; Basa 957/2158

**Köln:** BS Mester, Ga Rheydt Hbf; Basa 943/882/186 *75/184 oder 106*

**Mainz:** Bass Ritthaler, Bf Albsheim; Basa 954/832/420/3 *865/53*

**München:** BOBw Pollinger, BD München -HK —; Basa 962/1347

**Münster:** t BI Brandenburg, Bm Münster (Westf) 3; Basa 945/397


**Nürnberg:** BOI Gößmann, BD Nürnberg — V-Büro —; Basa 966/5857

**Regensburg:** t BOI König, AW Weiden; Basa 965/829/622

**Saarbrücken:** BS Hauptenthal, Ga Saarbrücken Hghf; Basa 956/523 *5557*

**Stuttgart:** BI Kiefer, BD Stuttgart — Ps-Büro —; Basa 952/5625

**Wuppertal:** BOI Graß, BD Wuppertal — T-Büro —; Basa 946/468



*Sed eble tiu vespero  
 kaj la urbeto kaj la mergiginta valo  
 aperas al mi tiel milda kaj alloga  
 nur pro tio, ĉar mi scias, ke morgaŭ jam denove  
 mi devos forlasi ĉion kaj plumigradi.*

*Mi opinias, ke  
 neniu homo amas la arbojn kaj riverojn,  
 la urbojn kaj kampojn  
 tiel profunde kiel tiu, kies sorto estas  
 kearsi ĝin nur unufoje per liaj manoj.*

*Sur sia surfaco la objektoj de tiu mondo  
 estas tiel belaj, tie tremas la spireto,  
 la kolora ĉarmo, la neesprimebla dolĉaĵo.*

*Migradi, nenion posedi,  
 tuŝi florantan branĉon,  
 preterpasi, nenion scii.  
 Tio do estas.*

Manfred Hausmann

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Barnickel, 6 Frankfurt (Main) 9, Karlstr. 4-6. Druck / preso: Limburger Vereinsdruckerei, 625 Limburg/Lahn. Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanta Fervoĵista Asocio.